La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono **(por dek du numeroj):**
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj, aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 37. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Julio, 1923.

BRAZIL PRO-ESPERANTIST.

The Minister for External Affairs and the Minister for Home Affairs were honorary presidents of the last (7th) Brazilian Esperanto Congress. The recent Congress of Brazilian Chambers of Commerce recommended the instruction of Esperanto in commercial schools and its use in correspondence with foreign chambers of commerce. The second American Congress for Economic Distribution and Commerce, held in Rio de Janiero, placed on record its conviction that in order to facilitate commercial relations it is necessary in all American countries to introduce Esperanto into the programme of commercial instruction.

ADVANTAGES OF ESPERANTO.

The advantages of having a knowledge of Esperanto when travelling in foreign countries have been demontrated time and again by Australians who have been abroad, but when these advantages are experienced in our own country we are more apt to sit up and take notice.

On its last trip there arrived on the "Orsova" three travellers from Switzerland, who could not speak a word of English. That this is a great hindrance cannot be denied, but in this case the situation was saved by one of the travellers being an Esperantist. At every port of call Esperantists were on the wharf to greet him, show him and his fellow travellers the various sights, etc., etc., and at Sydney Esperanto helped them to get their luggage passed through the Customs more rapidly than if they were left without assistance.

Esperantists of all lands are a practical people, as is shown by our organisation, the Universal Esperanto Association, which has members in 57 different countries. These, from among their numbers, elect a delegate and vice-delegate, whose functions are defined by the rules and regulations of the association. Assistance to travellers and international commerce is their chief duty.

The addresses of these delegates are issued in book form for the benefit of delegates and members. At the present time there are more than 1000 delegates in various cities and towns throughout the world.

"La Revuo Orienta" has the following paragraph:—"On the 5th March Mr. Stanton Brown, an English business man, visited Kioto. We were able to spend an agreeable day with him." So, at least, one wide-awake English trader is utilising Esperanto to push business in Japan!

COMMERCIAL CONFERENCE IN VENICE.

[Continued from last issue.]

The delegate of the Belgian Chamber of Commerce, London, summarised practical proposals submitted during the fourth sitting, and read a communication from the president of the Universal Esperanto Association, accepting similar suggestions. He, therefore, proposed the following resolutions:—

"1. That the U.E.A. be requested to publish in its year-book, or separately, a classified list of traders ready to correspond in Esperanto."

"2. That the U.E.A. be requested to publish commercial information in its paper, and as soon as possible to publish a commercial supplement thereto."

"3. That the U.E.A. be requested to compile commercial information, classified according to commodities and countries, and distribute it by sale."

4. That the U.E.A., through its delegates throughout the world, bring Esperanto under the notice of merchants, hotelkeepers, and tourist offices and agents and obtain concessions to Esperanto users."

"5. That the U.E.A. be requested to bring under the notice of exporters the admirable clearness of Esperanto roots for wireless telegraphy. By abbreviations, easily understood by telegraph users, Esperanto would be able to partly supersede the codes customarily used by large concerns. The use of Esperanto saves money and avoids error."

"6. That the U.E.A. be requested to select from its delegates fitting persons to operate the above services. That the U.E.A. be requested, when necessary to inaugurate a more ample organisation, and place at the disposal of traders the personnel and installation deemed desirable."

The resolutions were unanimously accepted and sent to the U.E.A., with the hope that its delegates would secure sufficient support to realise the expressed desires.

The following proposition by the Chamber of Commerce, Paris, was unanimously adopted:—

"That the U.E.A. be requested to supply the names of all commercial users of Esperanto to the compilers of commercial directories in all lands, asking that they signify Esperanto traders in a similar manner to the 'Bottin' directory, Paris, by prefixing a star to the name."

The delegate of the Annecy Tourist Office summarised the facts presented to the Conference in connection with the use of Esperanto by tourist offices. He proposed the four following resolutions:—

"1. The International Conference for a Common Commercial Language, in view of the successful results already obtained and the great number of guide-books already published in Esperanto, recommends tourist offices, agencies, and publishers to print guide-books in that language, or, at least, to devote some pages to a summary of their guide-books printed in their own language, as that is the most economical means of making known the attractions of any city or district in any country."

"2. The Conference invites hotelkeepers and kindred associations to introduce the teaching of Esperanto in their schools, and to have the language taught to their staffs."

"3. The Conference expresses the desire that tourist organisations should be urged by the U.E.A. to publish uniform size guide-books, arranged in accordance with the experience already gained, having consideration to the present situation and to the effective value of the publicity."

The resolutions were unanimously adopted.

The delegate of the Radio-Electric Society summarised the information submitted regarding "wireless," and the delegate of the General Union of Technical Scholars in Industry and Commerce reported regarding the permission to use Esperanto as a "plain" telegraphic language. They submitted the following resolutions:—

"This Conference, in which representatives of the Radio-Electric societies participated, attests that the world-wide spread of wireless telegraphy necessarily requires a means of overcoming the barriers of language, and recommends the use of Esperanto for communications destined for international listeners."

"The Conference expresses the desire that Esperanto be everywhere immediately recognised by telegraphic authorities as a normal language, under the 'plain' language rate. It recommends Chambers of Commerce and Esperanto societies to urge their central telegraphic authorities to write to the International Postal Union in Bern, intimating their consent to the addition of Esperanto to the list of accepted languages, as 11 countries have already done."

Both resolutions were caried without dissent.

The delegate of the Padua Chamber of Commerce moved:—

"That the Conference forward to the International Commercial Chamber the resolution of the Paris Chamber of Commerce just unanimously carried, and request that the subject be put upon the agenda for the coming Congress of the International Commercial Chamber."

The resolution was carried unanimously.

The delegate of the Roumanian Commercial Ministry reminded the Conference that the League of Nations had officially adopted the report of its general secretary after careful discussion and modification by a technical commission. That report attested the use and spread of Esperanto and its fitness for written and spoken communication, but the League decided to submit the question of its instruction in schools to its Intellectual Commission, for its opinion of the language problem. Above all else, that affected commerce and travel, and as the Commission was composed solely of scientists and litterateurs, it was the duty of the Conference to inform the Commission of the experience and desires of those directly interested—the practical men of commerce. Therefore, he presented the following resolution, not as a Government delegate, but personally, as the head of a very large business. The resolution is as follows:—

"The Conference respectfully draws the attention of the Commission for Intellectual Co-operation, deputed to further study the question of teaching Esperanto in schools and the various aspects of the auxiliary language problem to the following points":—

"The commercial world and travellers are primarily interested in the urgent need of a practical help language to facilitate trade, travel, and correspondence. That help language must be neither the language of any particular people, nor Latin, on account of the difficulty of learning, and archaism. The international fairs and many commercial concerns in all countries, have already successfully used Esperanto for international advertising, correspondence, and conferences, because of its neutrality and ease of acquirement. Therefore, the most practical solution of the difficulty is to encourage the use and instruction of Esperanto, as many important organisations and this Conference have done, after having proved the fitness of Esperanto."

The resolution was unanimously passed.

The delegate and director of the Commercial School of Odense, Denmark, was pleased that the Paris Chamber had taken the first step, and that the Italian Chamber for Switzerland the second. It was now the turn of the British, who should take over the task of making known the results of the Conference to the whole world. He proposed:—

"That the British delegation of the Conference endeavour to arrange that the commercial organisations of Great Britain should make known the results of the Conference to Chambers of Commerce throughout the world. Further, that the Conference request the British delegation to organise an international experiment in instructing Esperanto to commercial men of different nationalities."

The delegate of the Roumanian Foresters' Union said that, having come as an observer, he wished to express his admiration of the perfect operation of Esperanto as a language spoken and easily understood among the delegates from various nations.

The delegate of the Chamber of Commerce, Bucharest, reported upon the International Merchandise Exchange ("varborso" from "varo," wares; "borso," an exchange), which had been initiated by 40 traders attending the Conference. Sixteen orders had been negotiated. Esperanto had proved thoroughly fitting for all their negotiations, and many delegates had a double reason to be satisfied with their trip, for they had made a profit from the immediate use of Esperanto, as well as doing their best to extend its general use.

The President thanked the authorities of Venice for their hospitality, the Chamber of Commerce, and the Italian Chamber of Commerce in Switzerland, for their initiative. The Conference had been a great success, and would bring incalculable help to traders in all lands by affording them the long-desired means for untrammelled and direct intercommunication.

The representative of the Chamber of Commerce, Venice, in responding, said that the Conference had opened the eyes of the sceptics, and shown that the solution of a world problem had been discovered and satisfactorily

tried out. It now only remained to make that solution widely known.

The general secretary of the Italian Chamber for Switzerland said that he was fully convinced of the merits of Esperanto. He had never anticipated that the language could be used so readily and fluently. At the "varborso" the negotiations had been carried on with as much facility as if each participant had been speaking his mother tongue. Some of the speeches of the Conference had been really eloquent, and had charmed the ears of the Italians. Esperanto was as musical and harmonious as a southern language. The Conference had conclusively shown that the general use of Esperanto was desired not only by those corporations represented at the Conference, but by a large number of Chambers of Commerce and other institutions who had not participated in the Conference, but had expressed their approval by letter.

The general use of this practical world language would be a definite victory of human reason over one of the most harrassing of barriers which have, until now, hampered international commerce.

[This account is summarised from the verbatim Esperanto report published in "Esperanto," the official organ of the U.E.A., to which journal we express our acknowledgment.]

HERE AND THERE.

The Japanese papers are progressive. The "Japan Chronicle" has an Esperantist—Mr. J. A. Brailsford, an Australian--on the staff. After an address given by him to the Kobe foreign residents' Ramblers' Club, it was decided to commence the study of Esperanto.

The Hiroshima Higher Normal School has commenced a course of Esperanto with 70 students. A daily class in Amaki has an attendance of 150.

A class of 450 has been started in Tokio under the auspices of the Tokio "Asahi" newspaper and the Imperial Educational Association. Many wouldbe participants had to be excluded owing to lack of room, though some were very insistent, saying they were quite prepared to stand throughout the lessons.

The Commercial Industrial School, Kobe, in April commenced a six-months' course in Esperanto.

Despite the general misery throughout Austria, as the result of its depreciated currency and consequent lack of employment, Esperanto is making excellent headway. Latest reports show that 4714 persons are now learning Esperanto. From the town of Gratz alone 40 persons are going to the Nurnberg Congress. One group consists of compositors, who intend to form an Esperanto Compositors' Club. In Hainburg the Good Templars' Lodge is studying Esperanto. In Modling, near Vienna, a class of 32 consists chiefly of policemen. In Wels the pupils include bank officers. Throughout Austria school and municipal buildings are placed at the disposal of Esperanto groups.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—S-ro. Drummond, el Melburno, nun en Anglujo kun intenco ĉeesti la Nurnbergan Kongreson faros paroladojn en Esperanto pri Aŭstralio en Belgujo, Francujo, Italujo, Svisujo kaj Svedujo. Li parolos pri Aŭstralio celante allogi migrantojn kaj penos starigi komercadon en Aŭstraliaj produktaĵoj. Liaj paroladoj estos ilustritaj per lumbildoj.

Fraŭlinoj Johnson kaj Lewis, Kanadaj lernejinstruistinoj, kiuj pasigis kelkan tempon en Aŭstralio studante niajn instrumetodojn reiris al Kanado. Ili tre interesiĝis pri Esperanto kaj dum ilia restado en Melburno ofte ĉeestis la Melburnan Klubon.

Dum la lastaj tagoj anoj de la Esperanta klubo Melburna paroladis en kelkaj lokoj. Al la Camberwell Filio de la A.N.A. al la kluboj por Junaj Viroj de la Presbiteriana Eklezio ĉe Camberwell, al la infanoj de la plej alta klaso kaj la geinstruistoj ĉe la Surrey Hills Ŝtatlernejo, kaj al la Y.W.C.A. ili alportis la Esperantan lumon. Ili sentas, ke ili faris bonan laboron. Ankoraŭ estas strange kiel malklare la scio pri Esperanto daŭras. La Esperantistaro devos ĉiam trafi okazojn por paroladi pri la lingvo.

DARGAVILLE, Nov-Zelando.—Nova grupo nun kunvenas ĉi tie. S-ro. R. Pope estas sekretario.

BELGRAVE SOUTH, V.—Pro la gastemeco de Sinjorino Elvery, el Lockwood, South Belgrave, kiu pruntedonis dometon por semajnfino, 16 junion, dek Esperantistoj propagandis ĉe la Lockwood Hall, kie s-roj Pyke kaj Rawson montris lumbilde la propagandilon "Tra Centra Eŭropo per Esperanto." Estas kelkaj bonaj esperantistoj ĉe South Belgrave, inter ili estas pioniroj de nia movado ĉi tie en la personoj de Sinjoro Gossler, kaj f-ino Giles, instruantino al grupo filiigita al A.E.A.

INFORMO POR LA INTERNACIA FOIRARO.

Dum la lastaj tri jaroj ni ricevis multajn cirkulerojn, presaĵojn, afiŝojn kaj aliajn reklamojn pri Foiroj. La plimulto de ĉi tiuj atingis nin nur kiam la koncernataj foiroj jam estis pasintaĵoj. En la nuna semajno ni ja ricevis cirkuleron pri foiro kiu okazis en majo. Kompreneble, ĉiuj ĉi tiuj cirkuleroj en la cirkonstancoj ne faris ian utilaĵon, kaj la mono por iliaj presigo kaj forsendo senutile estas elspezita. La gvidantoj de la foiroj devas memori, ke la forveturo al Aŭstralio okupas kvin ĝis ses semajnojn kaj ke, se niaj komercistoj deziras iamaniere profiti rilate la foirojn ili devas havi la tempon aŭ vojaĝi, aŭ skribi, al la foiro. Tio postulos aliajn ses semajnojn, do, la foiraro devas forsendi siajn reklamojn ktp. pli ol tri monatojn pli frue ol nun. La samaj rimarkoj aplikos al la Malproksima Oriento kaj al Suda Ameriko. Kvankam bonaj rezultoj eĉ nun sekvis la uzon de Esperanto de la Foiroj, oni povas facile vidi, ke, se la eksterlando estas pli frue sciigata, ke egalaj bonaj rezultoj venos el lokoj kiuj ĝis nun, pro manko de la bezonata tempo, ne partoprenis aŭ iamaniere subtenis la foirojn. Nia intereso en Esperanto kaj deziro helpi al la foiraro instigis nin meti ĉi tion sub gia atento.

Schiller.

Kiam li estis juna, la konata germana poeto Schiller lernis ludi harpon. Amiko diris al li:

"Vi ludas kiel David, sed ne tiel bone."

Schiller respondis:

"Vi parolas kiel Salomono, sed ne tiel saĝe."

"LA KATALO."

Raportoj aperis de tempo al tempo, ke kolosa eksperimento en hibrideco okazis en Kanado. Estas raportita ke la bisono nun estas hibridigita kun la ordinara bovo, kaj naskema hibrido estas la produkto, kiu estas pli bona ol aŭ la bisono aŭ la bovo por utileco laŭ la homa vidpunkto. Senatano Sir George Foster, el Kanado, jam donis interesajn detalojn al Sir James Barrett. Ŝajne la amerika bisono estis preskaŭ ekstermita, ambaŭ en Kanado kaj Usono, inter unu mil kaj du mil ankoraŭ sin trovas en Usono, kaj la Kanada Registaro estis tiel bonŝanca ke ili povis aĉeti sep cent, de privataj posedantoj. La bisonaro pligrandiĝis ĝis ili numeris preskaŭ sep mil, kaj tiu pligrandiĝo ebligis la eksperimenton. La laboro de hibridigado de la virbisonoj kun bovinoj komencis en la jaro 1894, kaj estas en la lasta tempo pli vigle ellaborata. La produkto de la unua hibridigo oni nomas hibridon kaj al la ido de du hibridoj oni donas la nomon, katalo,—kunmetiĝo de la anglaj vortoj "cattle," bovoj kaj "buffalo," bubalo.

En norda Kanado estas multe da lando kun severa klimato, kie okazas neĝventegojn. La ordinaraj bovoj vagas antaŭ la neĝventegoj, sed la bisono kaj la hibrido povas kontraŭstari ilin, kaj, ankaŭ, estas imunaj kontraŭ la infektaj malsanoj. La felo de la katalo estas simila al tiu de la bisono laŭ kvalito, daŭreco, dikeco de la haro, kaj varmeco, kaj oni taksas la valoron je dudek funtoj. Tiuj ĉi bestoj bone sin paŝtas, ili elserĉas al si la nutraĵon, kaj prosperas en herbmalriĉaj kampoj, kaj dum la vintro ili elserĉas la herbon de sub la neĝo. La sola nutraĵo kiun oni donas al ili estas fojno, kaj tiu nur dum la plej severa vetero, kiam la neĝo estas la plej profunda. Cetere la viando ŝajne estas tre bona. Estas evidente ke se fiksita tipo de katalo povas esti produktata, ke Kanado povos aldoni multe al sia riĉeco per la produktado de tiuj bestoj sur lando kiu ne taŭgas por aliaj celoj. Kontraŭe, tamen, al la eldonitaj raportoj, nek la eksperimentoj estas kompletaj, nek decidigaj, sed tamen ili estas sugestaj.

La plejmulte de la unuaj malfacilaĵoj estas venkitaj per la eksperimenta laboro de S-ro. Mosson Boyd. Sinjoro Boyd mortis en la jaro 1915, kaj de

tiam la Registaro daŭrigis la laborojn kun la kataloj, kiujn S-ro. Boyd produktis. La malfacilaĵoj, kiujn li devis venki estis duoblaj. La rezulto de la unua hibridigo inter la virbisono kaj la bovino estis, ke multaj bovinoj kaj idoj mortis je naskiĝo, sed tiu granda mortado, ne daŭris en la sekvantaj hibridigoj. Plue, kelkaj el la unuaj hibridoj estas nenaskemaj. La problemo do estis produkti aron de naskemaj kataloj, per la venkado de tiuj ĉi malfacilaĵoj. Tiun ĉi celon ŝajne oni jam atingis—almenaŭ parte.

La celon de la eksperimentoj oni montras kiel sekvas:—(1) Fiksi la tipon kaj produktecon de la katalo. (2) Bredi kaj elekti katalojn por altvaloraj viandoproduktado, kaj dume konservi la altvaloron de la felo, kaj kapablon batali kontraŭ severa klimato. La intenco ne estas, tamen, loki la katalojn ie kie la kampoj povas esti uzataj por paŝti bovojn. Detaloj estas citataj de diversaj specoj de hibridoj de bubalo kaj bovino, kaj ankaŭ de hibridoj kun la tibeta bovo. La eksperimento nun jam progresis sufiĉe por pruvi la kvaliton de la viando kompare kun la ordinara bovviando, kaj la verdikto estas favora al la katala viando.

Jen estas mallonge la speco de la eksperimento kiun oni nun ellaboras. La leciono lernota en Aŭstralio kaj alilandoj estas la absoluta malsaĝeco permesi ke ia animalo estu ekstermigita. La bisono estis preskaŭ ekstermigita, kaj estas savita plejparte pro sentimento. Estas ne eble por iu ajn diri ke iu animalo, kiel ajn ŝajne neutila aŭ malgrava, ke ĝi ne povas fariĝi, je ia tempo, grandvalora por la homa raso. Estas esence tial, starigi azilojn kaj rezervejojn en kiuj aroj de sovaĝaj animaloj povas esti konservitaj por ĉiam. Estas por tiu kialo ke la Nacia Parka Komitato nun vigle laboras. De la tuta mondo interesitaj homoj sin turnas al Aŭstralio.

Ekspedicioj estas sendataj por kolekti specimenojn de niaj animaloj, ĉar la aŭtoritatuloj en aliaj landoj estas konvinkitaj ke la absoluta ekstermo de multaj el la aŭstraliaj animaloj estas proksimega. Estas nia afero fari nian eblon eviti tian grandan katastrofon.—El la Melbourne Argus, 2 junio, 1923, Tradukis P. T. B. Hudson.

KOMENTARIO.

"Literatura Mondo" elsendis "S.O.S." —Duonjaro pasis depost la ekiro de nia revuo. Eble do estas jam tepo ke ni parolu iom pri niaj ĝisnunaj spertoj, pri nia situacio, pri niaj perspektivoj. Ni mensogus dirante ke niaj revoj efektiviĝis. Ni imagis iel tiamaniere, ke Esperanto, kies evoluo dependas nepre de ĝia literaturo, certe bezonas literaturan gazeton, kie la boneco de la stilo estas garantiita per zorga kontrolo kaj laboro de kompetenta redakta komitato, gazeton, kiu per sia aspekto inde reprezentas nian lingvon kaj kiu tial estas unu el la plej bonaj propagandiloj. Sekve ni opiniis, ke la afero de nia gazeto estas komuna Esperanta afero. . . . Sed, konsiderante la ne privatan, sed komunan gravon de la afero, ĉu ne estas strange ke oni apenaŭ citas, kelkaj gravaj gazetoj tute ne citas nian revuon eĉ inter la ricevitaj gazetoj. Kaj ni apenaŭ, aŭ eble tute ne legis kritikon, kiu povus konjektigi al iu, kiom diferencas nia revuo de la aliaj malgravaj folietoj, kiuj estas tie vaste pritraktitaj.

. . . Nia ĉefa klopodo estas la kiel eble plej granda *internacieco* de la revuo. Sed ĉi tiun celon ni povas atingi nur per la helpo de nia kunlaborantaro. Ĉiuj niaj rubrikoj estas je ilia dispono. Granda ĝojo estus por ni numero, en kiu neniu redakta komitatano havus eĉ unu streketon.

—Precipe mankas al ni interesaj noveloj kun forta karakterizo kaj frapanta tem-plekto. Ni pensas novelojn laŭ maniero de *Maupassant*. Same ni volus doni ankaŭ al la rido ĝiajn rajtojn.

La aprila ekzemplero havis artikolojn sub titoloj: "Kadavro," "La ombro de l'patro el taglibro de frenezulo" kiuj plenigis duonon de la Revuo.

Mi certe konsilus la redaktoron, ke li iom gajigu la Revuon. Alie ĝi baldaŭ fariĝos kadavro same kiel la ombra patro de la frenezulo. La alia enhavo estas muziknotoj poemoj kaj aŭtobiografioj. Pri la stilo oni povas eldiri nur laŭdojn kaj se Revuo fariĝos pli internacia kaj havigos al si la mankantajn "interesajn novelojn" ĝi faros pli vastan allogon al la tutmonda Esperantistaro. —C. W. B.

SAVITA EL LA MARO.

Estis nokto, ventego muĝas laŭlonge la tuta angla marbordo. De tempo al tempo tra la mallumo signoj ekbrilas

de ŝipo, kiu baraktas kontraŭ la furiozeco de la vento, kaj ondoj, en malgranda distanco de la tero. Sur la marbordo estis bravuloj, kiuj pretigas la savboaton. La boato estas preta, ankoraŭ unu viro estas bezonata. Kiu iros? kiu helpos? Inter aliaj, kiuj estis sur la marbordo estis Nedĉjo Brown, kaj lia patrino. Nedĉjo, kiu estas bona fiŝkaptisto kaj maristo volas preni la lokon. Li kliniĝas ame al la patrino, kaj petegas—Ho, patrino, lasu min iri.

Jam ses monatoj, la patrino pensis, ŝi estas vidvino. Ŝia edzo estis fiŝkaptisto, kiu unu tagon dum la lasta printempo ekveturis en malgranda boato sur trankvila maro. Subite okazis terura ekventego, kaj la sekvanta mateno malgrandaj pecoj de la boato estis viditaj, sed la fiŝkaptisto ne revenis—kaj nun ŝi estas petata riski la vivon de sia knabo.

Kolera rifuzo ekvenis al la lipoj de la patrino, sed ŝiaj ĝenataj okuloj iras rapide al la senhelpa ŝipo; ŝi pensis pri la multaj vivoj, kiuj estas en danĝero sur ĝi, kaj pri la multaj hejmoj, kiuj estas minacataj de la perdo de la amatuloj; ŝi turnas sin al sia filo, kaj per voĉo tiel brava, kiel lia ŝi diris,—Iru mia filo, kaj Dio revenigu vin al la brakoj de via patrino.

Tiam lasinte rapide la marbordon, ŝi iris al sia soleca hejmo, pensante pri ŝia malnova malĝojo, kaj nova timo.

La mateno venas, la ventego estas pasinta, la koleraj ondoj supren ĵetas lanecajn kapojn super la malleviĝintan ŝipon.

La ŝipo malaperis, sed ne ĝia vivanta ŝarĝo. La savboato faris sian noblan laboron, kaj ĉiuj, kiuj estis en la ŝipo estas savitaj. La savitoj surteriĝis. Nedĉjo rapide foriris por informi la patrinon pri lia sekura reveno; sed, kial li hezitas ester la pordo de lia patrino? Tra la tuta nokto li montris sin la plej brava el la bravaj. Kial li sin detenas de eniro? Apud li staras alta, lacigita viro, kiun li savis el akva tombo, kaj, kies okuloj, plenaj de kortuŝo, neniam forlasas liajn. Ĉirkaŭ la du homoj staras multaj vilaĝanoj etendante la manoj al la viro, kaj parolante afablajn vortojn al li.—Kiu kuraĝas diri al ŝi,—diris unu per voĉo preskaŭ sufokata de kortuŝo.—Mi faros tion,—kaj post minuto Nedĉjo eniris la domon, kaj estis en la brakoj de lia patrino.

— Patrino aŭskultu! Mi havas iom mirindan por rakonti al vi. Unu el la fiŝkaptistoj, kiun ni savis, estis viro, kiun la ventego kaptis antaŭ kelke da monatoj. Feliĉe, alilanda ŝipo vidis kaj savis lin dum ĝi vojaĝis al malproksima lando.

— Malproksime al sia hejmo, edzino, kaj amikoj, la viro devis forveli. Liaj amikoj kaj edzino priploris lin, kiel mortinton. Li atingis fremdan landon, kaj ekveturis denove en la unua ŝipo ironta al Anglujo. Lastan nokton li sin trovis en la apudeco de lia hejmo; sed ventego muĝis sur maro, kaj tero kaj ankoraŭ denove unu fojon la viro staris vizaĝo al vizaĝo kun la morto. Helpo venis laŭ lia bezono.

— Patrino, penu elporti la feliĉan veron. Kiam via brava koro—koro, kia, en la mezo de sia malĝojo, povis pensi pri la malĝojoj de aliaj, forsendis min lastan nokton—vi ne sciis—kiel vi povus scii? ke vi sendis min por savi la vivon de mia kara patro.—Pluaj vortoj ne estas parolitaj. Paŝo estas aŭdata; la savita viro staras ĉe sia kameno. Kun krio de ĝojo la edzino kuregas antaŭen kaj falis en lian brakojn. —Tradukis R. B. Bigelow.

ZAMENHOF MONUMENT.

It was decided at the Prague Congress that Esperantists should erect a monument over the grave of Dr. Zamenhof, in the Warsaw Cemetery. The committee that has the project in hand is making a world-wide appeal that should touch the hearts—and the pockets—of everyone interested in Esperanto. Coupon sheets, each containing twenty shilling coupons, have now reached Australia, and may be obtained from Mr. J. G. Pyke, 212 Swanston Street, Melbourne. Where this is inconvenient, inquiries should be made of local group secretaries, who will obtain the required number of coupons for intending subscribers.

Ce Pentristo.

"Kiom da tempo necesas, por pentri portreton?" juna sinjorino demandis pentriston.

"Tio despendas de la cirkonstancoj; se la afero estas pri belulino, tre longan tempon," respondis la pentristo.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 30 junio ni ricevis la jenajn sumojn:—H. E. Neville, 9/-, ĝis junio, '24; J. G. Roberts, 4/6, ĝis februaro, '24; E. E. Lane, 5/-, ĝis septembro, '23; J. A. Moyle, 4/6, ĝis junio, '24; G. H. Jansen, 5/-, ĝis majo, '23; R. N. Crichton, 4/6, ĝis majo, '24; A. J. D. Cribb, 4/6, ĝis majo, '22; Hilda Lanyon, 4/6, ĝis januaro, '24; Harold Lanyon, 4/6, ĝis januaro, '24; Ivan Majstrovich, 5/-, ĝis marto, '24; H. H. Perrott, 4/6, ĝis majo, '24; H. Taylor, 4/6, ĝis oktobro, '23; E. S. Bigelow, 4/6, ĝis majo, '25; W. L. Waterman, 4/6, ĝis junio, '23; C. D. Boersma, 5/-, ĝis majo, '24; — Predl, 4/6, ĝis majo, '24; H. Ballentyne, 4/6, ĝis julio, '24; T. H. W. Goessling, 4/6, ĝis majo, '24; C. McKenzie, 5/-, ĝis julio, '24; T. H. Cameron, 9/-, ĝis junio, '24; J. Olen, 6/-, ĝis majo, '24; kontantaj vendoj, 24/3; reklamo, 1/-; Amerika Teo, £5/15/5.

GARANTIA FUNDO.

Dr. F. J. Williams, 5/-; A. R. Cohen, 7/6; R. N. Crichton, 5/6; H. H. Perrott, 5/6.

ESPERANTA TELEGRAFADO.

S-ro. Simon skribas:—En la raporto pri kongresa negoca diskutado ('Suda Kruco,' paĝo 78), oni legas, ke S-ro. Redfern proponis rezolucion pri Esperanta telegrafado, kion S-ro. Fosto subtenis.

—Parte tio estas ĝusta kaj parte malĝusta. Pro mia neevitebla foresto de la kunveno S-ro. Redfern anstataŭis min kaj evidente oni kredis, ke la rezolucio estis lia. Sed, ĉar mi jam delonge klopodis pri tiu temo, (eĉ en Nov-Gineo mi skribis pri ĝi al la Sekretario de la A.E.A.), mi tre ŝatus se korektaĵo povus esti presata en sekvanta numero. Pardonu min se mi estas vana, sed Esperanta telegrafado estas unu el miaj "vundaj punktoj."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperanto-Raporto, n-ro. 3; **Amerika Esperantisto,** mar.; **Belga Esperantisto,** jan.-feb.; **Esperantista Junularo,** jan.-feb.; **Esperanto Triumfonta,** n-roj 123, 131, 132, 134, 136; **Espero Teozofia,** mar.-apr.; **Export Esperantist,** mar.; **France-Esperanto,** apr.-majo; **Germana Esperantisto,** jan.; **Katolika Mondo,** apr.; **La Interligilo de l'P.T.T.,** apr.; **La Nova Epoko,** feb.; **La Progreso,** apr.; **La Revuo Orienta,** apr.; **La Ŝemisto,** jan.-feb.; **La Verda Ombro,** apr.; **Le Monde Esperantiste,** mar.-apr.; **Literatura Mondo,** apr.; **Pola Esperantisto,** apr.; **Sennacieca Revuo,** mar., apr., majo; **Skandinava Esperantisto,** mar.-apr.; **Tra La Literaturo, majo.**

Oni diras ke viskio mallongigas la vivon de drinkulo.

Jes, tamen li vidas duoble multe en la sama tempdaŭro.

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.